

La ministro pri eksteraj rilatoj de Rusio vizitas Kubon.



Serguéi Lavrov, ministro pri eksteraj rilatoj de Rusio komenciĝas oficiala vizito al Kubo, unua etapo de sia turniro, kiu ankaŭ inkluzivas Kolombion, Nikaragvon kaj Gvatemalon.

La rusa ministro oficiale dialogos kun sia kuba homologo, Bruno Rodríguez Parrilla, rilate al la reciproka agendo kaj temoj aktualaj, regionaj kaj internaciaj, inkluzive de la situacio rilate al Venezuelo.

La programo de la rusa ministro en Havano estas ampleksa, laŭ estis informite, kaj oni elstarigis la kuntekston de la vizito, pro la okazoj je la 8-a de majo kiam oni rememoros la 55-an datrevenon de la restarigo de diplomatiaj rilatoj inter la du landoj.

La oficiala komuniko elstarigas la solidan bazon kiu subtenas la kunlaboron ruso-kuban en la internacia areno, en la koincido aŭ proksimeco de pozicioj inter la du landoj.

Alia temo de la vizito de Lavrov en Havano rilatas al la preparo de la 13-a laborsesio de la interregistara komisiono pri kunlaboro ekonomia-komerca, kaj scienc-teknika, antaŭvidita por la 22-a de aprilo en la rusa urbo Kazán.

Lavrov konfirmis la intereson de Moskvo en interagado pli streĝa kun la latinamerikaj kaj karibaj landoj, kaj la pretecon ampleksigi la mekanismojn kunlaborajn kun diversaj grupoj de regiona integriĝo kiel la komunumo de latinamerikaj kaj karibaj landoj, la unuiĝo de sudamerikaj landoj, la suda komuna merkado

kaj la sistemo de centramerika integri?o (SICA).

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/50287-la-ministro-pri-eksteraj-rilatoj-de-rusio-vizitas-kubon>



Radio Habana Cuba